

Raportas Kubo 12 novajn kazojn kaj neniun forpason de Covid-19



Havano, jun 4 (RHK) La nacia direktoro pri epidemiologio de la ministerio de publika sano de Kubo, dro. Francisco Durán, informis hodiaŭ ke je la fermo de tiu ĉi merkredo, oni konfirmis 12 novajn kazojn pozitivajn de Covid-19 por totalo de 2119 personoj kaj neniun forpasinton.

Je sama dato, estas enhospitaligitaj por kontrolo epidemiologia 527 pacientoj. Aliaj 1955 personoj estas kontrolataj hejme tra la baza sanatento.

En tiu ĉi tago oni analizis 2100 samplajn, el kiuj 12 estis pozitivaj kaj la lando jam akumulas 112 449 studitajn samplajn kaj 2119 pozitivajn.

La novaj kazoj konfirmitaj estis kubanoj. El ili ĉiuj estis kontaktoj de konfirmitaj kazoj. El ĉiuj konfirmitaj kazoj 89,5% estas kontaktoj de antaŭaj pozitivaj dum 133 el la kazoj venas el eksterlando. El la totalo konfirmita 1111 estis sen simptomaj.

El la novaj kazoj 6 estis virinoj. El la 2119 pacientoj diagnozitaj, 195 restas enhospitaligitaj kiel aktivaj kazoj. La nombro da forpasintoj entute estas je 83, kun indikilo de morteco je 3,9% sub la nivelo de la amerika regiono. Kubo restas je la pozicio 17 rilate la mortec-indikilon en la regiono. Restas la nombro da du eksterlandanoj evakuitaj al siaj respektivaj landoj kaj 1839 jam rekuperintaj (9 pliaj hieraŭ). Neniu paciento estas en kriza stato kaj 4 en grava stato.

Ĝis sama dato la mondo akumulas pli ol 6 milionojn da kontaĵitoj pro tiu ĝi malsano kun indikilo de morteco je 6,0 % dum la amerika regiono havas proksimume 48,0% el ĝiuj kazoj en la mondo. La nombro da konfirmitoj estas pli ol 2 milionoj kaj duono. La nombro da forpasintoj en la regiono montras indikilon de morteco je 5,57%.

Spite al la favora evoluo de la malsano en Kubo, Havano iĝis dum la lastaj tagoj, centron de la epidemio, pro ne korekta plenumo de socia distancigo kaj tial la aŭtoritatoj insistas pri la bezono plu gardi la socian izoligon por eviti revigliĝon de la nova kronviruso. Pri tio la havanaj aŭtoritatoj pli strikte kontrolas la sekurecajn regulojn epidemiologiajn.

Dume la kuba registaro pritaksas la evoluon kaj preparas strategion por iri al rekuperigo kiam venu la momento en la venontaj monatoj.

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/224702-raportas-kubo-12-novajn-kazojn-kaj-neniun-forpason-de-covid-19>



Radio Habana Cuba